

Leterkesto, 5.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.11.14 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni konkludas nian salutadon al aŭskultantoj, kiuj sendis mesaĝojn, dankante al ĉiuj, kiuj indikis interkrampe per esperanta fonetiko la proksimuman prononcon de siaj nomoj substrekante la familian. Poŝtkartojn kun esperanto-tekstoj aŭ stampon pri esperanto-kongreso ni transsendis al la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), esperanto-fako de la Urba Biblioteko en La Chaux-de-Fonds.

A.- Josef LECHERMAIER en Ingolstadt-Irgertsheim, Germanio, regule eldonas informfolion pri ĉiuj radio-stacioj kun esperanto-elsendoj. Lian adreson ni volonte havigos al interesatoj.

Cl.- Jon LIECHTY (Ĝan Liĥti) en Bloomington (Blumin-ton), Indiano, Usono, skribis: "Mi aŭskultas viajn elsendojn preskaŭ ĉiusemajne. Mi plej ĝuas vian salutadon al skribintoj; tiel mi ne sentas min tiom izolita. Mi ankaŭ ŝatas vian legadon de eroj de libroj. Mi estas 26-jara muzikstudento ĉe la muzik-lernejo de Indiana Universitato ĉe Bloomington. Ankaŭ mi ŝatas sciencan fikcion, radio-aŭskultadon, kaj ĉiu-specajn prilingvajn aferojn... Vi ĵus diris, ke vi ne legos plu leterojn, ĝis kiam via leter-kesto ree pleniĝos. Jen do iomete da helpo, por pli rapide ĝin plenigi..."

A.- Luisa Madella en Parma, Italio, skribis: Viajn belajn elsendojn mi bone kaptas kaj plurfoje mi surbendigas ilin por transdoni ilin per kasedoj al amikoj, kiuj interesiĝas pri ili."

Cl.- Saluton al France MARN en Ljubljana, Jugoslavio, al Miny MASSAR en Alkmaar, Nederlando, al Betti MAUL en Augsburg, Germanio kaj al Bradley MCDONALD en Auckland, Nov-Zelando, kiu kun sia hind-devena edzino estas regulaj aŭskultantoj.

A.- Norbert MERKENS en Wuppertal, Germanio, sendis 4 aŭdraportajn mesaĝojn. Koncerne nian diron pri la vorteto "po" kaj ties ĝustan uzon li skribas: "Vi ne volis decidi, ĉu "po" estas prefikso aŭ prepozicio. Laŭ la kompreno de germanoj ĝi estas nek nek, sed adverbo komparebla al "nur, preskaŭ" ktp.

Cl.- Montriĝas, ke prilingvaj elsendoj estas utilaj kaj interesaj por multaj. Ni notas la temon "po" por estonta elsendaro, en kiu ni analizos per komparoj la gramatikan konsiston de la vorteto "po", kiu verŝajne estas prefikso.

A.- Saluton al Noel E. MATONDO en Luanda, Angolo kaj dankon al gesinjoroj Bruno kaj N. NAJBARO en Keighley, Britio, pro iliaj 15 poŝtkartaj mesaĝoj. Interalie ili salutis el la 75-a Brita Kongreso okazinta en Morecombe ĉe okcidenta marbordo, kie ilin distris 12 hungaraj infanoj 8-9-jaraj, kiuj bele kantis por ili en Esperanto.

Cl.- Jean-Jacques NOEL (Ĵan Ĵak) en Mer, Francio, estis jam regula franclingva aŭskultanto de Svisa Radio Internacia. Pli kaj pli li aŭskultas ankaŭ la esperanto-programon. Ni citas lin: "Mi malkovris Esperanton per amiko, kiu, kiel mi, estas radio-amatoro, kaj mi eklernis ĝin en januaro 1990. Lerninte la anglan kaj germanan lingvojn en lernejo, sed neniam parolinte ilin, mi trovis Esperanton facile lernebla. Uzante ĝin en radiokontaktoj kun eŭropaj kaj brazilaj radioamatoroj, mi rapide spertiĝis en parolado. Ĉu vi scias, ke svisaj radioamatoroj ne rajtas uzi Esperanton (el inter aliaj lingvoj), dum la plej multaj eŭropaj radioamatoroj rajtas tion

fari? Espereble tio ŝanĝigos. Mi uzas modernan ricevilon FG-800 YAESU, kaj pro tio mi ofte surbendigas je la 14a horo 30 viajn elsendojn sur la 31 aŭ 49-metraj bendoj, kaj mi aŭskultas ilin vespere post mia laboro. Mi ankaŭ kelkfoje pruntedonas la kasedojn al mia amiko, kiu gvidas kursojn. Mi gratulas la tutan teamon de la esperanto-redakcio pri la bona kvalito kaj komprenebleco de la elsendoj.

A.- Saluton al Leif NORDENSTORM en Lulea, Svedio, al Ladislav ODEHNAL en Brno, Ĉeĥoslovakio, al Ōsaki Hiroshi en Maebashi-shi, Japanio, al Polina PANĈENKO en Moskovskij, Ruslando kaj al Paul PARSONS (Paŭl Parsjnz) en Thornton Heath (Tornten Hit), Britio, kiu skribis pri la angla fonetiko: "Ĉu vi vere ne komprenas la anglan fonetikan sistemon? Estas tutsimple: reguloj mankas. Do, mi skribis mian nomon kaj adreson esperant-sone.

Cl.- Saluton al Leopold PATEK en Aŭstrio, al Jiri PATERA en Praha, Ĉeĥoslovakio, al Eŭgeno S. PEREVERTAJLO en Taŝkent, Soveta Uzbekistano, kiu estas redaktoro de la esperanto-rubriko aperanta regule en la monata ilustrita revuo Soveta Uzbekistano. Ni atentigas niajn geaŭdantojn, ke tiu tre interesa revuo aperas en 12 lingvoj, inter kiuj la araba, franca, angla, rusa, uzbeka (tre simila al la turka), germana, hindia, hispana. Interesatoj povas aboni la revuon tra la perado de UEA.

A.- Saluton al Alain PIERRE en Monsegur, Francio, kaj al F. W. POPPECK en Oberkirch, Germanio, kiu salutis el Suda Tirolo per bela poŝtkarto, al Cveta POPOVA en Perniu, Bulgario, kiu petis la adreson de korespondemulo kaj serĉas personon inan aŭ viran, kiu aĝas 60-70-jarojn kaj akceptus interŝanĝi leterojn. Ni volonte transdonos ŝian adreson al interesatoj.

Cl.- Jacques RAVARY en Trelissac, Francio skribis franclingve: "Ces émissions sont écoutées avec attention et plaisir par tous les espérantistes de ma région (Bordeaux et environs)".

A.- Esperantigo: "Tiu elsendoj estas aŭskultataj kun atento kaj plezuro fare de ĉiuj esperantistoj en mia regiono, Bordojo kaj ĉirkaŭjo".

Cl.- Dankon al Hernani A. RESENDE (Ernani Rezend) en Lisboa, Portugalio, pro liaj 2 mesaĝoj, kaj al Ludwig RÖLL en Günzburg, Germanio, pro liaj 17 aŭdraportoj.

A.- Richard HOWARD anoncis, ke nun li laboras ne plu en Ĉinio, sed en Ĉeĥoslovakio.

Cl.- Saluton al Vilmos SÁGI en Székesfehérvár, Hungario, al Natalja SAPAŜ en Novobatajsk Bratskij, Sovetio, kaj al Erich SEIDEMANN en Dresden, Germanio, kiu skribis: "Ĉu vi volas gratuli nin pro la unuiĝo de ambaŭ esperanto-ligoj okcidenta kaj germana dum la 69-a Germana Esperanto-Kongreso la 17-20-ajn de majo 1991 en Munkeno?".

A.- Jes, la strebado al unueco, kiu karakterizas ĉiujn germanajn organizaĵojn kulturajn, inter kiuj la esperantaj, estas gratulinda.

Cl.- Ĉijare en aprilo kaj julio mi havis la okazon restadi en Köln kaj Aalen kaj mi povis diskuti kun esperantistoj kaj neesperantistoj pri la reunuigaj problemoj, kiuj estas ofte pli kompleksaj, ol oni imagas. Ĉiuj diris, ke eĉ se la kostoj estos pli altaj ol antaŭvidite, ili tamen estos multe pli malaltaj, ol tiuj de permilita reunuigo, kiu estas pli kaj pli minaca.

A.- Hans Georg STRAUSS en Leverkusen, Germanio, sendis 2 mesaĝojn.

Cl.- Li ĝojis renkonti min en Köln, kie mi restadis tri semajnojn por perfektigo en la uzo de la germana lingvo, kiun mi instruas en elementa lernejo al 9- kaj 10-jaraj infanoj.

A.- Ni konkludas nian leterkestan elsendaron per saluto al Georgij TUJAKIN en Moskvo, Sovetio. Kaj ni ree dankas ĉiujn skribintojn. Jam nun nia leterkesto komencis repleniĝi, sed nur la venontan jaron ni ree konversacios peronde kun la skribintoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontajn semajnojn ni dediĉos al speco de perfektiga kurso, kiu komprenigos kelkajn evolutendencojn de Esperanto. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ĝis la reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*